

Clarence Bicknell,

## Soneto

En ĝardeneto sola rozo floris:  
 Ĉe l' norda land' ne kreskis roz' pli bela;  
 Nenio en naturo pli odoris;  
 Ĝarden' nenia estis tiel hela.

Dancadis ĉiam apud ĝi fraŭlinoj;  
 Poetoj lertaj laŭdi ĝin ne ĉesis  
 Kaj sub la lumo pala la feinoj  
 Akvumis ĝin kaj l' ombron eĉ karesis.

Senzorga, ve! la ĝardenist' fariĝis!  
 Fraŭlinojn kaj feinojn li formetis;  
 Raŭpar', pro senpluveco, amasiĝis,

Kaj sin sur floron kaj foliojn ĵetis.  
 Di' gardu ĉion! Helpon se ne portas  
 Ĉielo, la plej bela floro mortas!

*Verkinto de tiu ĉi Esperanta poemo estas CLARENCE BICKNELL (\*1842-10-27 – †1918-07-17).*

*Arg-970-1952 (2014-02-15 20:57:42)*

*Tiu ĉi poemo troviĝas en la retejo [http://eo.wikisource.org/wiki/Soneto\\_\(Bicknell\)](http://eo.wikisource.org/wiki/Soneto_(Bicknell)). Pri la poeto vidu la vikipedian retejon [http://eo.wikipedia.org/wiki/Clarence\\_Bicknell](http://eo.wikipedia.org/wiki/Clarence_Bicknell).*